

La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

Nro 4/1984 ★ Kr 8,50



LA BLUA VENTO

de Moa Martinson

*La anemonoj jam floris
en jaroj kaj jaroj mil
la kor' kiu froste rigoris
vekigis en ĉiu april.*

DEN BLÅA VINDEN

*Sydsläntens sippor har blommat
i tusen och tusen år
och sinnen som frusit och domnat
ha vaknat varje vår.*

Moa Martinson

Tras Salex mar 1984

OBS! KONGRESSÄNDRINGAR se sid 4

Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro,
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm,
Telefon: 08-11 74 34.

EsperantoCentro är öppet
måndag-torsdag kl. 17-19.
Postgiro: 20 12-3, Esperanto-
förbundet.

Medlemsavgift:

Direktanslutet medlem 65 kr,
ungdomsmedlem t.o.m. 20 år 35 kr,
familjemedlem (utan tidning) 25 kr.
Prenumerationsavgift för *La Espero*
ingår i medlemsavgiften.

Medlemmar under 30 år får dessutom
ungdomsförbundet SEJUs blad *ktp.*

SEF:s styrelse

Ordförande: Roland Lindblom
tel. 08-777 41 75,

Sekreterare: Anita Lindblom
tel. 08-773 40 24,

Kassör: Karin Lindquist
tel. 0589-155 31,

Märtha Andreasson, Niklas
Gustafsson, Kerstin Rohdin,
Birger Vigen.

Suppleanter:

Ingemar Nordin, Åke Rohdin.

La Espero

Organ för Svenska
Esperantoförbundet.

Adress: EsperantoCentro,
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm.

Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg.

Redaktion:

Karin Lindquist (huvudansvarig)

Vasagatan 8C, 732 00 Arboga,
tel. 0589-155 31.

Ulf Ribers, Norra Freberga,
591 90 Motala, tel. 0141-220 35.

Bertil Danielsson (layout)

Årjäng, tel. 0573-105 69.

Fotosats och tryck:

EsperantoCentro, Stockholm 1984

Manuskript sändes en månad före
utgivningsdatum till

Karin Lindquist (adress se ovan).

Esperantoförlaget

Postadress:

Box 7502, 200 42 Malmö.

Besöksadress:

Möllevångsgatan 20 B.

Öppettider: 1 sept.-15 maj:

onsdagar 10-11, torsdagar 17-18.

Skriftliga beställningar expedieras
hela året, även under sommaren.

Telefon: 040-12 20 29.

Postgiro: 578-5.

Expedition: Wivi Nilsson.

Styrelsens ordförande:

Anita Lindblom.

HODIAŬ

La Espero

Mi volas ripeti la disdondatojn por *La Espero* ĉijare:

30 aprilo

15 junio

30 aŭgusto

15 oktobro

30 novembro

La manuskriptoj devas esti ĉe la redaktoro unu
monaton antaŭ tiuj datoj — volonte pli frue! Ne
forgesu, ke foto ofte plibonigas la artikolon — foto
nigrablanka!!!

Ĝis revido en skövde! Redaktoro

ANNONSER I LA ESPERO

Kostnaden för *La Espero* är ganska hög, trots att nästan
allt arbete sköts ideellt. För att inte ta för stor bit av med-
lemsavgiften till framställning och distribution av medlems-
tidningen kommer vi att i begränsad omfattning ta en del
av utrymmet i tidningen till annonser. I första hand erbjude-
r vi medlemmarna att annonsera.

Annonskostnader

1/1-sida kronor 1.200

1/2-sida „ 725

1/4-sida „ 425

2 spalter x 6 cm 250

Annonsen måste vara redaktören tillhanda minst en månad
före pressläggning — gärna i det skick ni vill ha den införd.

MEMBRONOMBRO

Ĝojiga kontrolo de la membronombro por 1983 montris
la resulton de 1 510 membroj, kiu estas altigo de 76 mem-
broj.

Dungito

Bedaŭrinde ni ne plu havas dungiton en la Esperan-
toCentro. Petter Ödeen finis pro soldatservo. Ĉar la
reguloj por preteca laboro ŝanĝiĝis tiel, ke ni mem
devas pagi duonon de la salajro, anstataŭ kvaronon,
ni ne povas elspezi tiom. Ni provas solvi la
problemon diversmaniere, ĉar estas bezonate havi
helpanton en la EsperantoCentro, krom la Stokhol-
maj klubanoj, kiuj tiel fervore regule deĵoras.

Ĉu vi permesas? Prezidanto:

INNEHÅLL/ENHAVO

- 47 Prezidanto
- 48 Kongressändringar
- 49 Pri traduko naci-lingven de Esp...
- 50 Bildkarta kampanjo
- 51 Esperanto auto-
didakte
Klubo Cent
- 52 Tra la lando
- 53 Revuo de revuoj
Ekzameno pri lego-
kapablo
- 54 Komisiono pri
virina agado
- 55 Opinio: Brutte
kaj vatto -
ĉu esperanto?
- 56 Gresillon invitas
Kalendaro
Poemo de Dan An-
dersson

Ĉu reklamo efikas? Certe, se ĝi estas lerte farita kaj atingas la "viktimon" en taŭga momento.

La financoj de SEF ne permesas grandajn luksajn broŝurojn, kiujn ni povus disdoni al ĉiu leterkestoposedanto en la lando — tio kostus milionojn da kronoj.

Por ni estas grave trovi diversajn grupojn de homoj, kiuj bezonas la lingvon esperanto por siaj ideoj.

Pasintjare SEF kaj Norvega Esperantoligo faris komunan numeron de *La Espero*. SEF dissendis ĝin al ĉiuj studrektoroj de ĉiuj lernejoj elementaj kaj gimnazioj. Laŭ raporto ni scias, ke kelkloke oni ĵetis la gazeton, sed aliloke la intereso vekigis. Lastatempe mi aŭdis, ke pro tiu numero de *La Espero* oni vokis nian kolegon Folke Vejbro en Gävle al gimnazio por prelegi. Post tio alia gimnazio en Sandviken ankaŭ petis al Folke prelegi. Bonege, ĉu ne?

Personoj, kiuj legis "Uppropet" kaj vidis la nomojn sub ĝi, fariĝis pli respektplenaj; tial



estas grave utiligi la Alvokon ankoraŭ kelkan tempon.

SEF faris afiŝeton el la Alvoko: 45×67 cm. Ni intencas distribui ĝin al ĉiuj kluboj, tamen nur unu ekzempleron al ĉu. Se vi poste volas havi pliajn, vi devos mendi kaj pagi.

Ankoraŭ pri reklamo kaj reklamiloj: Ĉu vi rimarkis, ke UEA havas novan simbolon por la asocio — literojn UEA kaj terglobon? Ĝi venas el Finnlando kaj estas ideo de Harri Melasniemi el Turku. Li ankaŭ interesiĝas pri afiŝoj kaj broŝuroj kaj nun estas preta helpi al SEF. Ni esperas pri baldaŭa rezulto, ĉar oni ĉiam bezonas ion novan.

Ĝis revido en Skövde!

Roland Lindblom

PRESSTOP PRESSTOP PRESSTOP

KONGRESSÄNDRINGAR

ÅRSKONGRESSEN I SKÖVDE

Av olika skäl har LKK blivit nödsakade att avbeställa Billingen, då erhållna priser baserats på flera deltagare. LKK har lyckats få rum på ett par mindre hotell. Priset där blir max kr 150 per person. (Event. återbetalning efter årskongressen).

ANMÄLAN HELENASKOLAN

Alla förhandlingar samt supén lördag kommer att ske på Helenaskolan. Där anmäler ni er när ni kommer – öppet från kl 18.00 fredag. Skolan ligger ett par 100 meter från järnvägsstationen.

ÄNDRING SÖNDAG

Utflykten på söndagen blir mellan kl 11.00–14.30. En gudstjänst är inlagd kl 11.15–11.45 (alt. till denna en promenad på Billingen). Av LKK medhavd lunch ätes gemensamt ute i naturen.

UNGDOMAR!

Ungdomar anmäl er – gratis logi på Helenaskolan enligt tidigare!

EFTERANMÄLAN

Efteranmälan för alla kategorier kan ske.

Skövde – Esperanternas träffpunkt i vår!

FÖRLAGSFÖRENINGEN

Ändringar i kongressprogrammet har gjort det möjligt att lägga Förlagsföreningens årsmöte på söndagen (13 maj), som traditionen bjuder.



Enköpings Resebyrå Nord-Syd Resor, Enköping

Krestomatio de Esperanta Literaturo

Det är ett märkligt urval av litteratur, av historiska och biografiska uppgifter som doktor Istvan Szerdahelyi, Budapest, med medhjälpare har åstadkommit, nämligen *Krestomatio de Esperanta Literaturo, tekstoj, dataro, bibliografio*, i tre volymer. Det väldiga verket omfattar esperantospråkets begynnelseår fram till omkring år 1920.

Första volymen, med L. L. Zamenhof själv, hans liv, författarskap och brevväxling. Sedan följer esperantolitteraturens framväxt inom det tidigare ryska kejsrerliga imperiet, inom Sydösteuropa och Mellaneuropa, t.ex. Bulgarien, Rumänien och Grekland.

Andra volymen behandlar sådana viktiga länder för esperantospråket som Ungern, Österrike och Tyskland. Nordeuropa med alla de fem skandinaviska länderna är med. Och i samband med dem behandlas också Nederländerna och Belgien.

Tredje volymen behandlar resten av jordklotet, men börjar i Europa, Schweiz, Italien, Spanien-

Venu kun ni al

LENINGRAD kaj TALLINN

9–16 JUNI, entute 2.395:–

Ŝipo, trajno, Stockholm–Helsinki–Tallinn–Leningrad. 1 tagon en Tallin, 3 tagojn en Leningrad. Kollhozo, rondtabla konferenco kun sovetaĵ instruistoj. Plena manĝigo, unuklasaj hoteloj, ekskursoj, cirko, folkloro spektaklo, fina festeno en restoracio "Kavkaz". Nia gvidanto, rusparolanta, esperantisto, volonte informos vin, Sven Jonsson, 018-11 98 25. Bon volu mendi antaŭ la 8-a de majo.

Telefon 0171-356 63

Pri tradukado nacilingven de esperantaj verkoj

Ni ricevis la ĉi-suban leteron de Baldur Ragnarsson, kiu estas estrarano pri kulturo kaj edukado en la estraro de UEA. Ni publikigas ĝin en sia tuto. La ideo estas brila, sed kiu respondecu pri la agado? Propone oni povas krei grupeton da personoj, kiuj interesiĝas pri literaturo kaj konas esperanton sufiĉe bone. Se vi havas emon, skribu al la estaro de SEF, Brunnsgratan 21, 11138 Stockholm.

LA LETERO

"Estimataj samideanoj,

Ofte oni levas la demandon, kial ne estas pli aktive tradukataj originalaj verkoj el esperanto en la nacilingvojn. Iuj eĉ opinias, ke almenaŭ ne malpli

Portugal. Sedan följer Latinamerika, Storbritannien, Nordamerika (USA, Kanada) och till sist ett rikligt svep över Oceanien, Afrika och Asien.

De tre banden, som tyvärr bara är häftade, omfattar tillsammans 1 268 sidor. Man blir imponerad av att Esperanto kan uppvisa ett sådant världssomspännande inflytande redan för mer än 60 år sedan. Professor Szerdahelyi och hans medhjälpare har gjort en stor insats i esperantoforskningen genom att göra all denna esperantovetenskap tillgänglig för vår tids studerande, rika källor att ösa ur för den som vill fördjupa sig i ämnet. Samlingen är samtidigt ett gott propagandamedel, som pekar mot framtiden. Esperantister på olika orter bör övertala "sina bibliotek" att skaffa denna vetenskapliga serie. (Serien finns t.ex. redan i Stifts- och Länsbiblioteket i Skara.)

Gustav Stenholm

valoras tiaj tradukoj, se sukcesaj, ol la kreado de novaj originalaj verkoj en la internacia lingvo. Nuntempe, kiam la esperanta literaturo jam staras firme, kiel aŭtentika kaj certa-paŝe disvolviganta literaturo, oni pli emas konsideri tian vidpunkton. Certe jam estas tempo pli sisteme labori sur tiu tereno.

En *Esperanto en perspektivo*, eldonita antaŭ unu jardeko, estas supervido pri la ĝistiamata stato de nacilingvaj tradukoj de esperantaj originalaĵoj (paĝoj 241 — 244). Ĝis 1973 ekzistis en nacilingva traduko 64 originalaj esperantaj volumoj en 35 lingvoj. Post tiam certe aldoniĝis pliaj, el kiuj la plej menciinda estas la nederlanda traduko de *La infana raso* de Auld en traduko de W.A. Verloren van Themaat.

Laŭ mia opinio la landaj asocioj povus multon fari por antaŭenigi tiun valoran agadon, kvankam ne nepre en formo de tutaj volumoj. Multe valorus, kaj eĉ pli el propagandada vidpunkto, tradukado de mallongaj verkoj, noveloj kaj poemoj, kiujn eblus sendi al revuoj kaj ĵurnaloj por eventuala aperigo.

Por instigi al tia tradukado ŝajnas al mi bona ideo, ke la landaj asocioj starigu naciajn tradukkonkursojn. Kelkaj mallongaj verkoj estus tiam elektitaj por la konkursoj, kiujn prijuĝu komisiono. La landaj asocioj poste prizorgu pri publikigo de la plej bonaj rezultoj en nacilingvaj revuoj aŭ per aliaj komunikiloj, nepre ĉiam menciante, ke



La glumarkoj de la jarkongreso en Skövde vi povas mendi ĉe SEF jarkongreso, Skövde, pĝ. 481 43 95 — 2 aŭ SEF, Stockholm, pĝ. 20 12 — 3.

32 glumarkoj (2 folioj) kostas 10 kronojn. La koloroj estas verda, nigra kaj flava.

temas pri verkoj originale kreitaj en esperanto.

UEA volonte donus aŭspicion al tiaj konkursoj.

Kun samideanaj salutoj, via
Baldur Ragnarsson"

TACK

Varmt tack till alla som bidragit till "Esperantorummets" Jesudasson, Colombo.

Insamlingen gav 760 kronor.

Amy Nilsson

UK-GLUMARKOJ

Mendu la UK-glumarkojn ĉe Wim Posthuma, poŝtĝiro 91418-4.

10 markoj kostas kr 3:—, plus 1:90 por afranko. Vi povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj, adreso Soldatgatan 40 — 42, 72345 Västerås.

Bildkarta kampanjo la 15an de majo 1984

Ni volas

influi al la kvin nuklearmilaj ŝtatoj malarmigi.

Kiel?

Per tio, ke homoj sendos bildkartojn al la plej altaj gvidantoj en tiuj ŝtatoj.

Kiuj sendos la kartojn?

Kiel eble plej multaj, ĉefe en Svedio. Nia celo estas, ke ĉiu ŝtatestro ricevu minimume 500.000 kartojn. Tio signifas, ke oni devos sendi 2.500.000 kartojn.

Kiuj estas ni?

La gelemantoj en la klaso 8b en "Sanna"-lernejo en Gotenburgo kaj membroj de la gotenburga regiono de Internacia virina asocio por paco kaj libereco (IVPL) - Internationella kvinnoförbundet för fred och frihet (IKFF)

Kiuj estas la nukleo-armilaj ŝtatoj?

Britio, Ĉinio, Francio, Sovetunio kaj Usono.

La kartoj

La bildo sur la karto estas farita de lernanto en klaso 8b. La teksto estas ellaborita de gelemantoj kune kun membroj de IVPL.

La kartoj estos vendataj en aroj de 5 kartoj kune — po unu karto al ĉiu el la nomitaj ŝtatoj. 5 kartoj kostas 5 kronojn. Ĉiu karto en la aro estas provizita per adreso al ŝtatoficisto de respektiva lando kaj kun teksto en la lingvo de respektiva lando. Ĉirkaŭ la kartaro estas banderolo kun teksto en la sveda (aŭ en esperanto, se vi

volas peti helpon de esperantistoj en aliaj landoj, ĉar la kampanjo estos internacia).

La bildon sur la karto vi vidas ĉi-apude — helpu forvendi!

Kiam la kartoj estos sendataj?

Nia celo estas, ke kiel eble plej multaj kartoj estu sendataj la 15-an de majo, sed estos eble sendi ilin kaj la semajnon antaŭ kaj post tiu dato, kaj ankaŭ poste.

Ekonomio

Tiuj, kiuj povas apogi nin ekonomie, bonvolu sendi monon al la poŝtgira konto 29988-3. Ĉiuj kontribuoj estos bonvenaj, kaj grandaj kaj malgrandaj.

Kunlaborado

Ni esperas pri kunlaborado de grandaj organizoj, kaj rilate al ekonomia subteno kaj helpo per distribuado kaj vendado.

IKFF -IVPL

IKFF -IVPL estas parto de internacia organizo, kiu nomiĝas angle Womens International League for Peace and Freedom, kun sidejo en Genevo. Per tiu organizo kun membroj en 26 landoj aliaj landoj estos admonataj fari ĉi tiun kampanjon samtempe.

Gajno?

Nia celo ne estas havi gajnon, tial la kartoj estos vendataj kiel eble plej malmultekoste, por ke kiel eble plej multaj havu eblecon ilin aĉeti. Se estos gajno, ĝi unuavice estos uzata por vojaĝo por la klaso al

Genevo por viziti UN-n kaj aliajn internaciajn organizojn. Eventuala resto estos uzata por internacia projekto por akceli interŝanĝon de gejunuloj.

Novo kaj adreso

VYKORTSKAMPANJEN
DEN 15 MAJ KLASS 8b SAN-
NASKOLAN/IKFF
Jordhyttegatan 5
41473 Göteborg
tel. 031-120044 (IKFF)

Ĉu ni esperantistoj kunlaboru?

Mi ricevis demandon, ĉu la esperantistoj, kiuj havas tiom da internaciaj kontaktoj, povos kunlabori kaj helpi konatigi la kampanjon eksterlande. La tempo ne sufiĉas por grand-skala kampanjo, se ĝi okazu la semajnojn ĉirkaŭ la 15a de majo. Sed ni provos fari ion. Tial ni komisie mendis 500 kartojn, do 100 arojn po 5 kartoj. Unu aro kun 5 kartoj kostas 5 kronojn. Se vi volas mendi, sendu monon al la poŝtgira konto 841989-7, M. Andreasson, kaj notu vian nomon kaj al kiu ni sendu la kartojn. Aldonu iom da mono por la sendkosto.

Kaj jen la teksto sur la bildkartoj

"La tero estas la sola loko en la universo, kie ni povas vivi. Tial ne neniigu ĝin! Se okazos nukleoarmila milito, ĉiuj kaj ĉio mortos aŭ deformiĝos. TIAL MALARMIGU NUN! Ne permesu, ke la potencobatalo murdu la teron — lasu ĝin kaj nin vivi! La plejmulto de la homaro volas HAVI PACON!"

Märtha Andréasson



Saluton!

Esperanto autodidakte

**Internacia Lernolibro de la
Internacia Lingvo.**

Författarinnorna:

Audrey Childs-Moe.

Illustrator: Stano Markovic.

Tk Stafeto.

Antverpeno-La Laguna 1983.

Pris: 88:—.

Saluton, denna nya lärobok är skriven helt på Esperanto och åskådliggör texter med bilder och pilar.

Idén med en internationell bok verkade spännande tyckte jag. Översättning till olika nationella språk är ju då ej behövlig och skulle kunna användas direkt av människor i hela världen. Tanken är ju också enligt författarinnan att kunna lära sig Esperanto helt på egen hand såväl som med hjälp av instruktör.

Vid närmare påseende tycker jag att den ej är tydlig t.ex. där hon redan på första sidan tar upp ackusativ-n och samtidigt den fria ordföljden, vilket jag tycker skulle vara omöjligt att förstå för en självinstruerande, och som kanske ej heller har vanlig grammatik i färskt minne. För en van språkstudierande skulle det kanske gå. Något om uttal och betoning finns ej förrän i senare delen av boken, då den studerande lärt sig att läsa något. För övrigt flyter texten fram rätt bra med nya ord markerade med kraftig text.

Jag tycker sålunda att boken kan vara bra med hjälp av instruktör och med bredvidläsning av grammatik förklarad på det nationella språket.

Som lärobok i en internationell grupp kunde den med fördel användas med hjälp av Esperantoinstruktör och eventuellt i samband med någon direkt metod.

Ingrid Ottosson

KLUBO CENT

Vilket resultat! Redan nu (tom mars månad) har strömmat in 3.900:— kr vilket överträffar resultatet för hela 1983 med god marginal.

Vi vill framföra ett hjärtligt tack till alla "medlemmarna" i Klubo Cent för det fina resultatet men vill också påpeka att det finns plats för fler. Ni vet väl hur det går till att bli medlem? Det är bara att sätta in 100:— kr (eller mer) på postgiro 2012-3.

Ni skall veta att pengarna behövs om vi skall kunna förverkliga åtminstone en del av de planer vi har i styrelsen och de som kommer in från medlemmarna!

"Nya medlemmar" perioden februari—mars:

Ivar Paulsson, Solna	Esperantoföreningen i Gävle
Arvid Johansson, Huskvarna	A. Strandman, Höör
Sven Sundin, Växjö	Siri Estberger, Sundsvall
Malte Smith, Kävlinge	Olga Farm, Sundsvall
Erik Svärd, Malmö	Gunnar Malmgren, Farsta
Tore Johansson, Kalmar	Ove Kleborgh, Hässleholm
Signhild Johansson, Kalmar	Gunnar Birgersson, Huskvarna
Sven Strandberg, Lund	Erik Lundvall, Borlänge
David Sandström, Malmö	Anna Ekbohm, Boden
Eugen Rytenberg, Uppsala	K. H. Persson, Motala
Ljungby Esperantoklubb	Ruben Enocson, Solna
Estrid Lund, Krylbo	K. A. R. Norsten, Örebro
Karl-Erik Bergström, Arboga	Hässleholms Esperantoklubb
Ulf Ribers, Motala	Karl Gustafsson, Bergvik
Karin Lindquist, Arboga	Skövde Esperantoklubb
Anna Östensson, Saltsjöbaden	S. Uno, Motala

Dessutom har esperantoklubbarna i Helsingborg och Uppsala skänkt vardera 300:— kr:

För styrelsen
kassören

INSAMLINGEN TILL INDIEN FORTSÄTTER

Det har länge varit tyst kring Indien-projektet, av olika orsaker. Vi har inte tillfredsställande lyckats nå ut med information om insamlingen, dess mål och syfte.

Det är allmänt bekant att den indiska esperanto-rörelsen brottas med stora ekonomiska svårigheter beroende på sociala förhållanden helt olika våra.

Avsikten med insamlingen är att i mån av möjlighet bidra till att stärka esperanto-rörelsen i Indien.

Med den målsättningen bildade vi en arbetsgrupp om tre personer Jack Snarberg, Per sjödin och

Victor Janheim — som gick ut till esperantisterna med en vädjan om bidrag. Jönköpings Esperantoklubb ställde sitt postgirokonto 87 24 68-4 till förfogande med revision och ekonomisk redovisning.

Vår vädjan om fortlöpande bidrag med förslagsvis 10 kr per månad eller engångsbelopp har inte förklingat ohörd. Revisionen inför det gångna årsskiftet redovisar att Indien-projektets konto håller 6.700 kronor.

Insamlingen fortsätter. Önskvärt vore bildandet av en förvaltningskommitté. Frågan kan tas upp på kongressen i Skövde.

Victor Janheim



Nordokcidenta regiono

Medlemmarna i "NOREK" (Nord-Okcident-Regiona Esperantista Kunveno) vill ha hjälp av kvinnor i andra länder att göra ett konstverk för kongressen.

Det är ett projekt, som kom upp i samband med den årliga träffen mellan esperantister i de amerikanska staterna Washington, Oregon, Alaska och den kanadensiska provinsen British Columbia.

Man ville göra ett konstverk till kongressen i Vancouver, där man på något sätt kunde få med kvinnor från hela världen i arbetet. Man valde en teknik, som man använder t.ex. i sticktäckan. Alltså tre lager tyg, det övre är det viktigaste, det kan vara broderat, prytt med motiv enligt applikationsmetoden m.m., mellanlagret är vadd av något slag och det undre är något enkelt tyg, som håller ihop det hela.

Det här vill NOREK-kvinnorna ha för att åstadkomma sitt konstverk:

Tygkvadrater med bilder av berömda broar från olika länder. Grundmaterialet ska vara bomull eller polyester, krympt. Alla material, som ni använder ska vara tvättbara, färgbeständiga. Storleken på kvadraterna ska vara 305x305 mm (12 tumx12 tum). Runt kvadratens kanter kan ni lägga till ytterligare 15 mm av grundmaterialet för att man ska kunna sy ihop kvadraterna.

I nedre högra hörnet ska ni brodera med kedjestygn ert namn, namnet på bron och namnet på platsen (alla tre på

ert nationsspråk) och namnet på landet (på esperanto). Motivet ska vara en bro, men f.ö. får ni använda vilken teknik eller vilka färger ni själva vill.

Färdiga konstverk ska sändas till: Sara Ann Estling, 1351 Grant St., Walla Walla, Washington 99362, USA. Hon kommer att ansvara för hopsyningen och monteringen. Hon kommer att behöva ett par månader för det arbetet, så sätt genast igång, om ni vill vara med. Ni har fortfarande en möjlighet. Sänd arbetena som rekommenderad post, ber Sara Ann.

Varför har de valt en bro? Anledningen är att bron är en symbol för esperanto, "bro-språket" mellan folk och nationer.

Under kongressveckan kommer era alster att visas upp i kongresssalen. Efter kongressen kommer de att visas upp på populära lokala mässor i USA och Canada och på så sätt kommer de att bli ett ovanligt propagandamedel för Esperanto.

Mer uppgifter från: Olga du Temple, 765 Braemar Ave, SIDNEY, B.C., V8L 3S1 Canada.

Märtha

Okcidenta regiono

Det största arbetet i Göteborg för tillfället är den kommande utställningen "Kvinnor Kan" den 3-6 maj. Den sysselsätter en hel del människor ständigt. Vi har sänt ut intervjuformulär till ett ganska stort antal kvinnor i hela världen. De har kommit tillbaka de allra flesta av dem, tillsammans med diverse material. Det kommer att bli ett svårt men roligt arbete att pussla ihop det hela till en tilltalande utställning. Studiecirkeln i "Hur man gör en

utställning" hjälper oss till en del.

Vi kommer att ha några utländska gäster hos oss. Pepita de Caspary och Tamiko Kauakami Nielsen från Oslo, Spomenka Stimec från Zagreb och Akiko Snarberg, Jönköping, har lovat att delta på olika sätt.

Spomenka och Pepita kommer redan på fredag den 27 april och kommer då också att leda ett par av grupperna för den sista intensivkursen för våren, som äger rum 27-28 april. Inbjudan till kurserna kommer att sändas ut inom den närmaste tiden.

Spomenka kommer att stanna i Sverige till den 14 maj och kommer också att vara gäst på SEFs årsmöte i Skövde. Under veckan mellan utställningen och årsmötet ska hon besöka andra klubbar och platser i Väst-Sverige.

I intensivkursen i slutet av maj var också Pepita de Caspary lärare för en grupp. Dessutom deltog ytterligare två från Norge, 7 st. kom från Varberg och 1 från Skövde. Tillsammans med göteborgarna blev det ca 30 personer, som deltog i kursen.

Göteborgs Esperantoförening håller på med en serie föreläsningar, 4 st., av vilka det för ögonblicket återstår 2 st.

Kungälv Esperantoklubb håller bl.a. på att göra ett "konstverk" en bild av den påseglade Tjörnbron, som förhoppningsvis ska vara klart att sändas till Canada inom den närmaste tiden.

Falköpingsklubben arbetar för fullt med att få fram material för närradioutsändningen, i höst ska någon form av radiokurs sändas är det tänkt, till dess ska man varje vecka sända en kvarts information om esperanto.

I Borås har man lyckats få igång en nybörjarkurs med flera unga deltagare.

I Uddevalla har man ingen klubb, men däremot har man fått uppgift om att en gammal fond i en fackklubb, som stått kvar sedan Einar Dahls tid, har växt till en ganska ansevärd sum-

Revuo de revuoj

KIEN INTERLINGVISTIKO? oni demandas en *El Popola Ĉinio*. La demandanto Zhou Li seke konstatas, ke "La internacia lingvo estas esperanto". Ne nur lingvajn demandojn li traktas, sed ankaŭ donas konsilojn, kiel la mova-

LA REVUO PACO honoras la centjaran datrevenon de la naskiĝo de Jaroslav Hašek, aŭtoro de la fama antiheroo Ŝvejk. Aperas ankaŭ traduko de lia novelo "Fatala kunsido de senarmiga konferenco" [devus esti 'malarmada']. La

ma. Vad man ska göra med pengarna är inte klart ännu.

I Lysekil arbetar Barbro Karlsson och Sven Utberg. Flera tidningsartiklar och annan information har man åstadkommit.

Märtha

Suda regiono



ESPERANTO EN LA LERNEJOJ

En ARLÖV (urbeto tuj ekster Malmö) kelkaj gelemantoj en unu el la lernejoj (Vårboskolan) mem interesiĝis pri Esperanto dank'al la ekpozicio ĉe Skånemässan, Malmö, pasintjare, kaj propravole petis permeson de la instruisto Erland Håkanson aranĝi t.n. gruplaboron pri Esperanto. La bildo montras parton de la efika laboro. Dekstre la instruisto E. Håkanson. La laboron iniciatis kaj kunhelpis s-ro Lennart Magnusson, Esperanto-informanto en Malmö.

revuo bedaŭrinde ĉiam favoras komunistajn tendencojn. Pacmovado devas esti senpartia.

(Paco, eldono de ĈS-MEM-sekcio 1983)

WILLIAM AULD skribas mallonge pri La fundamento de esperanto. Li pravas, ke ĉiu lingvo bezonas netuŝeblan fundamenton por ne morti.

(Kontakto 80, 4/1983)

LA LANTERNO AZIA estas eldonata de Korea Esperanto-Asocio. Oni raportas pri la 2-a komuna Esperanto-Seminario inter korea kaj japana junularoj. La seminario okazis dum du tagoj fine de julio. En la sama numero aperas koreaj fabloj tradukitaj al esperanto.

SLEA-INFORMILO estas simpla bulteno kun multaj interesaj artikoloj, i.a. Raporto pri Laborista Esperanto-klubo 1983, felietono pri la vivo de Zamenhof, letero de Olof Palme, informo pri Argentino [oni skribis 'Argentino']. (SLEA-informilo 1/1984)

Salex

Ekzameno pri legokapablo?

Dum mia laboro en Esperantujo kaj precipe dum mia aneco de la Esperanto-Instituto mi povis ofte konstati, ke multaj novaj esperantistoj sufiĉe rapide venas al stato de bona kompreno de esperanta teksto, dum ilia eblo produkti iom ne tro erarplenajn tekstojn estas tre malfacila afero.

Al mi venis la ideo starigi ian ekzamenon kun malpli altaj postuloj ol por la elementa ekzameno. Oni ja fakte per legado povas havi bonan utilon de nia lingvo, ankaŭ kiam mankas kapablo fari skribajn aŭ buŝajn tradukojn en la lingvon. Eble, mi pensis, la studentoj de nia ligo havus intereson por ia konfirmo pri sia legokapablo. Tio eble povus esti instigo por ili daŭrigi la studadon ĝis pli alta nivelo.

En la direkto de la Esperanto-Instituto mi faris proponon aranĝi tian "subelementan ekzamenon". Oni trovis la proponon interesa kaj decidis, ke mi verku artikolon por *La Espero* por en tiu maniero demandi al la esperantistoj tra la lando, ĉu ili opinias, ke tia ekzameno estus iel valora.

Do, al vi kursgvidantoj kaj aliaj, kiuj havas intereson pri la studaj problemoj, mi direktas la demandon: Ĉu vi pensas, ke estus bone havi ian ekzamenon pri legokapablo, ekzameno, kiu postulu tradukon nur en la svedan lingvon kaj konon pri nur la plej bazaj gramatikaj reguloj?

Viajn bonvolajn respondojn sendu plej laste unu monaton post la apero de ĉi tiu alvoko al Oskar Svantesson, Skonertgatan 1, 42174 Västra Frölunda.

Komisiono pri virina agado

Kio ĝi estas kaj kiel ĝi laboras?

La komisiono estis starigita dum la internacia jaro de la virino 1975. Kiam la Unuiĝintaj Nacioj lanĉis tiun jaron por atentigi pri la diskriminacio de la virino, UEA sentis sin speciale alparolata. Laŭ la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj ne ekzistu diskriminacioj, nek pro lingvo nek pro sekso.

Ĉar la statuto de UEA akcentas, ke la atento de homaj rajtoj estas esenca kondiĉo de ĝia agado, estis memkompreneble sekvi la rekomendojn de UN.

Por gvidi tiun laboron en UEA oni starigis apartan komisionon. Anoj de la komisiono estis Elsbeth Bormann, Ursula Grattapaglia, Yukiko Isobe, Erszebet Pallós kaj Ib Schleicher, plus pluraj kunlaborantoj. Ĉiu landa asocio elektis respondeculon pri virina agado.

La ĉefaj taskoj de la komisiono estis: komenci novajn aktivecojn sur la virina kampo, mem aktivi en la mondvasta laboro de UEA kaj kunordigi la diversajn agadojn kunlige kun la jaro.

Kiel unuan taskon la komisiono faris sian eblon atentigi la esperantistinojn pri la diskriminacio de virinoj, por fortigi la konscion, ke ankaŭ inter la esperantistinoj devus esti io farata.

Fine de la internacia jaro de la virino kaj komisiono pridiskutis, ĉu la virinoj agu en aparta faka asocio, sed oni decidis momente ne starigis tian. Nur unu lando havas ĝis nun virinan organizon por esperantistinoj — Japanio.

Oni vizitis multajn virinajn kongresojn kaj konferencojn kiel oficialaj reprezentantoj de UEA. Dum tiu jaro estis vere multaj okazoj por propagandi por esperanto kaj atentigi pri la situacio por la virino en la socio kaj en la esperantosocietoj.

La aktivaj kunlaborantinoj en la virina laboro konvinkigis, ke esperantista virina agado utilas kaj por la parolantoj de esperanto kaj por la plibonigo de la situacio de virinoj ĉie en la mondo. Ili tial decidis daŭrigi sian laboron.

la estraro kaj komitato de UEA samopiniis kun ili. Pro tio la komisiono fariĝis konstanta komisiono pri virina agado.

La virina komisiono de kelkaj jaroj laboras laŭ speciala modelo. Unue ĝi organizas dum la Universalaj Kongresoj specialajn programerojn por virinoj. Ĝi serĉas kontaktojn kun la landaj virinaj organizoj, kie okazas la UK kaj strebas doni pli grandan atenton al la rolo de la virino en la disvastigo de esperanto. Ĝi aktive alpaŝas virinajn asociojn por konvinki ilin pri la avantaĝoj de esperanto kiel internacia komunikilo inter virinoj. Ĝi ankaŭ aranĝas specialajn seminariojn por virinoj diversloke kaj starigas kursojn por kuraĝigi virinojn paroli publike kaj fortigi ilian memfidon.

En la komisiono laboris diversaj personoj. Ni jam menciis la unuajn; ilin sekvis Eliza Kehlet, Anna Brennan kaj Loes Demmendaal. De pasintjare estas tri svedinoj kaj unu francino, kiuj prizorgas ĝin. Estas propono, ke ankaŭ

KORESPONDA SERVO MONDSKALA

Koresponda Servo Mondskala havas novan adreson:

"Les Hortensias 2"
121 bis Boulevard Napoleon III
F. 06200 Nice.

Ili ankaŭ fariĝis la reguloj laŭ sube:

1. Kiam vi petas korespondanto(j)n bonvolu indiki vian nomon, adreson, aĝon, sekson, profesion, civilan staton, kiam da korespondantoj vi deziras? de kiuj landoj? pri kiuj temoj?
2. Post kelkaj semajnoj vi ricevos leteron de viaj novaj korespondantoj. Se post unu monato vi ankoraŭ ne ricevis leteron, avertu K S M, kiu sendos al vi novajn adresojn.
3. Ĉiufoje kiam vi petas korespondanton de KSM vi devas aldoni 2 internaciajn respondokuponojn.

Se vi volas korespondi pri filatelio aŭ kolektado bonvolu kontakti Esperantoligo Filatelista-Amika Rondo de Kolektantoj.

grekino kaj du japaninoj estu en la komisiono por doni pli internacian karakteron al ĝi.

Dum la konferencoj kaj kongresoj oni konstatis, ke la problemoj por la virinoj ofte estas samaj ĉie en la mondo, ke virinaj tradicioj kaj virina kulturo ofte estas ligitaj al la hejmo kaj la familio, ke paco estas temo por virina agado en ĉiuj mondopartoj, ke virinoj ĉie ankoraŭ estas diskriminaciaj, ke la multaj kontaktoj inter esperantistinoj pri komunaj intereso rezultigis en vera sento de komuneco. Jes, oni konstatis, ke oni bezonas unu la alian.

Märtha Andréasson

Brutte kaj vatto: — ĉu esperanto?

kion signifas en esperanto duobla litero? En la naŭa regulo de la Fundamenta gramatiko estas skribite: "Ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita." La angla teksto aldonas la pluan klarigon, ke "ekzistas neniuj silentaj literoj." Tio signifas, ke oni devas elparoli ĉiun unuopan literon de esperanta vorto.

Kaze de duoblaj vokaloj oni ĉiam tion faras: *metroo, scii, pliigi* ktp estas prononcataj kun du aŭdeblaj vokaloj. Sed ekzistas ankaŭ duoblaj konsonantoj.

La fundamenta regulo faras neniun diferencon inter vokaloj kaj konsonantoj, kaj sekve ankaŭ duoblajn konsonantojn ni devas elparoli duoble. Tia duobligo okazas en du manieroj: plenregule, per du konsonantoj aparte distingeblaj, aŭ malpli regule, dum rapida pli senzorga parolo, per nur unu konsonanto, kiu foje povas esti pli longa ol normale.

En la kazo de "daŭraj" sonoj, frikativoj (*s, ŝ, f ...*), nazaloj (*n, m*) kaj likvidoj (*l, r*), la distingo inter du apartaj kaj unu pli longa, estas nula aŭ signifa. Sed ĉe plozivoj (*t, k, g ...*) ni havas alian situacion. Ĉi tie du konsonantoj neniel egalas al unu pli longa. Ĉe ekzemple *t* ni havas du prononcoelementojn, unue almeton de la langpinto al la dentvico, kio kreas halton de la aerfluo kaj sekve *silenton*, due ĉesigon de tiu halto per eksplodo, kio kreas *bruon*. Plozivo do estas sinsekvo de silento — bruo. Ĉe duobla plozivo ni devus havi sinsekvon de silento — bruo —

silento — bruo, por havi plene duoblan konsonanton. Pli longa plozivo estas aliflanke sinsekvo de silento pli longa — bruo, kio neniel estas duobligo de unu sola plozivo.

Duoblaj konsonantoj ekzistas en du specoj de vortoj. Unue en kunmetaĵoj: *ekkuri, ellerni, plennoto, forrajdi* ktp. En tiaj vortoj ambaŭ prononcm manieroj uziĝas: kaj la plene regula kun duoble elparolataj konsonantoj, kaj la malpli regula kun nur unu, eble pli longa. Tia malobeo de la prononcreguloj dum rapida, ĉiutaga parolo, estas natura kaj tolerinda.

Due ni havas la maloftajn vortojn, kiuj havas duoblajn konsonantojn ene de la radikoj: *brutte, regatto, vatto* k.a. Ĉe ili la situacio estas iom stranga. Plej multaj parolantoj uzas por tiaj vortoj nur la malpli regulan prononcmieron, eĉ dum la plej malrapida kaj

aliparte zorga parolado aŭ legado. Vorto kiel *brutte* devus kiel bazan kaj zorgan prononcon havi du apartajn *t*-sonojn, alie ni havus unu silentan literon, kontraŭfundamente. Ke ĝi dum rapida parolo estas prononcata per unu, pli longa *t*, estas alia afero. La problemo estas, ke oni uzas kiel bazan prononcon, malobeon de la fundamentaj reguloj. Nu, tiaj vortoj estas feliĉe tre malmultaj, sed ĉi tiu analizo, kaj la fakto ke oni mispronocas ilin, pruvas, ke ili ne konformas al la strukturo de esperanto, ke ili estas fremdaj elementoj en la lingvo. Mi ne volas diri, ke ili estas kontraŭfundamentaj, nur ke ili ests tre malelegante faritaj vortoj, kiujn oni apenaŭ povas prononci, se oni volas sekvi la regulojn de la lingvo. Vortoj kun duobla "daŭra" konsonanto (*n, s, l ...*) estas akcepteblaj, ĉar ili povas konduki same kiel vokaloj, kun duobliĝo aŭ plilongiĝo sen signifoplena diferenco. Sekve vortoj kiel *finno* ja estas bonaj esperantaj vortoj, sed vortoj kiel *brutte, regatto, vatto* ktp estas tute fremdaj kaj devus esti anstataŭigitaj per aliaj, pli facile prononceblaj. Kalocsay diras en sia *Lingvo, Stilo, Formo* (1970), ke oni ne povas anstataŭ ili proponi pli bonajn", sed jen provproponoj:

<i>brutte</i>	× <i>brutoe</i>
<i>Buddo</i>	× <i>Budho</i> (jam la pli ofta)
<i>nette</i>	× <i>netoe</i>
<i>regatto</i>	× <i>regatao</i> (aŭ laŭ PIV: <i>boatfestto</i>)
<i>vatto</i>	× <i>vato, uato, ŭato</i> (laŭ mi <i>vato</i> estas tute tolerebla homonimo)
<i>vendetto</i>	× <i>vendetao</i>

Simila problemo ekzistas ĉe tri aliaj vortoj kun plej ofte silenta konsonanto aŭ afrikato: *budĝeto, maĉo kaj pitĉo*.

Anstataŭ ili mi uzus: *buĝeto* (jam la pli ofta) *maĉo* (tolerebla homonimo) *tonalto* (pli esperanteca vorto).

Ĉe propraj nomoj mi opinias, ke la problemo ne estas same akra, ĉar tiaj nomoj ne ĉiam vere estas partoj de la lingvo, kaj tial ili povus foje havi iom fremdan formon.

Ĉia kritiko al la ĉisupraj ideoj kaj proponoj estas tre bonvena.

Bertil Wennergren

Esperanto-Domo Gresillon invitas al Kulturaj aranĝoj 1984



Prelegoj kaj kursoj

inter la 1a kaj 22a de julio:

- prelegoj diverstemaj
- seminario pri rekta metodo de instruado de esperanto laŭ la Baza Kurso
- kursoj diversnivelaj por internacia ĉeestantaro
- konversacioj
- malkovro de la regiono

Kursoj

Inter la 22a de julio kaj 5a de aŭgusto:

- kursoj trinivelaj por internacia ĉeestantaro
- konversacioj
- malkovro de la regiono

Esperanto per Slojdo

Inter la 5a kaj 19a de aŭgusto:

- inicia kaj progresiga kursoj per la praktikado de fotoarto, ceramiko, ŝtofmozaiko, kartonprilaborado ...
- kurso pri la praktiko de la esperanto-strukturoj
- vizito de la regiono kaj de artmetiejoj

Renkontiĝo de blindaj kaj neblindaj esperantistoj

Inter la 19a de aŭgusto kaj la 2a de septembro

- kultura programo, kursoj, distraĵoj diversaj

Prezoj:

Printempa Renkontiĝo de Infanoj: 50 FF

Aliaj periodoj:

unu semajno aŭ malpli: 50 FF
du aŭ tri semajnoj: 100 FF

Esperanto-Domo, Gresillon,
49150 BAUGE, Francio
Telefono: (41) 89 10 34
Ekster la aranĝoj prefere skribu.

Kalendaro

3 — 6 majo

Virinoj kapablas ("Kvinnor kan"). Ekspozicio. Svenska Mässan. Göteborg

11 — 13 majo

Jarkongreso de SEF. Skövde

21 — 30 junio

52a Internacia kongreso de blindaj esperantistoj. Italio

6 — 13 julio

Bicikla karavano Dover — Swanwick. Britio

13 — 20 julio

40a Internacia junulara kongreso. Britio

21 — 28 julio

69a Universala kongreso de esperanto. Vankuvero, Kanado

19 — 31 aŭgusto

Internacia junulara seminario pri la kooperativo. Kaposvár, Hungario

Ĉiun monaton

Internacia esperantokursejo. Bulgario

Mi atendas ...

(Jag väntar ...)

*Atendas mi ĉe fajro dum forglitas la horoj
dum la steloj migradas en nokta pasad'.*

*Atendas mi virinon el vojoj tre foraj
plej kara, bluokula, alloga nomad'.*

*Allogis migranta neĝoza floro
mi revis pri tremanta petola ekrid'
imagis mi alveni la revon de l' koro
tra arbaro, tra la kampoj sub stela gvid'.*

*La karan mi alportus kun ĝoj' al kabano
tra arbedoj kaj neĝo per forta brak'
triumfe ŝin salutus, karesus per mano:
Bonvenon, atendata, ĉe mia bivak'!*

*Atendas mi ĉe fajro dum forglitas la horoj
dum arbaroj kantadas sub nuba velad'.
Atendas migrulinon el vojoj tre foraj
plej kara, bluokula, alloga nomad'.*

Dan Andersson, kantisto de la sovaĝejo en traduko de Salex.